**INTER-RELIGIA RENKONTIĜO (en la franca urbo Nico je la 25a de junio 2025)**
prezentado de D-ro *Éric Bernard COFFINET* pri la Bahaa Kredo (ebcoffinet.fr)

## MALLONGA HISTORIO DE LA BAHAA KREDO

La historio de la Bahaa Kredo komenciĝas en Persujo la 23an de majo 1844, kiam sian profetan mision deklaras Ali Muhamad Ŝirazi, kromnomita Bab ("Pordo", 1819-1850). Li fondas la baban movadon de renovigo socia kaj religia, kiu fulmrapide disvastiĝas tra la lando. La Babismo staras kiel nova religio aparte de Islamo kaj sekve estas sovaĝe persekutata de la persaj aŭtoritatoj religiaj kaj politikaj. Bab estas enprizonigita kaj poste pafmortigita, dum liaj adeptoj estas persekutataj kaj amasbuĉataj.

Elstara babano estas Mirza Hosejn Ali Nuri, kromnomita Baha'u'llah (la "Splendoro aŭ Gloro de Dio", 1817-1892), kiu en 1852 estas katenigita en la subtera karcero de Teherano kromnomita Sijah-Ĉal (la "nigra truo"). Tie li travivas mistikan sperton, kiu al li rivelas lian profetan mision. Ĉar li estas filo de ministro de la Ŝaho kun potencaj apogoj, li ne estas mortigita kiel siaj kunuloj sed estas senigita je ĉiuj siaj bienoj kaj ekzilita kun siaj familianoj al Bagdado en 1853. Afliktita de konfliktoj inter la ekzilitaj babanoj, li ermitiĝas en la montaroj de Kurdujo (1854-1856), kaj poste revenas al Bagdado por revivigi la baban komunumon. Li tiom kreskigas ĝiajn famon kaj influon, ke la otomana Sultano ordonas lian ekzilon ĉiam pli foren de Persujo, al Konstantinopolo (1863), poste al Andrianopolo (1863-1868) kaj fine ĝis lia morto al Akko (1868-1892), ĉiam kiel prizonulo de la otomana Imperio

Forirante el Bagdado al Konstantinopolo en 1863, li publike deklaras al sia kunularo sian profetan mision kaj fondas la bahaan religion sendependan. En Andrianopolo li skribas al la tiutempaj regantoj politikaj kaj religiaj por anonci al ili sian mesaĝon, kaj li alfrontas la ribelon de sia duon-frato Subh-i-Azal ("Aŭroro de Eterneco", 1831-1912, la "estro" de la baba komunumo). Incitita de kvereloj inter azalanoj kaj bahaanoj, la otomana Sultano ekzilas la unuajn al Cipro kaj la aliajn al Akko en Palestino. Tie Baha'u'llah rivelas siajn plej gravajn verkojn, kiel la Kitab-i-Aqdas (1873, la "Plej Sankta Libro" aŭ libro de la leĝoj), por strukturi sian komunumon kaj la venontan mondon. Per sia testamento li nomumas sian plej aĝan filon 'Abdu'l-Baha Abbas ("Servanto de Baha", 1844-1921) kiel la estron de la komunumo bahaa. Tiu lasta vojaĝas tra la kontinentoj eŭropa kaj nordamerika inter 1911 kaj 1913 por diskonigi la instruojn de sia patro kaj testamente nomumas sian nepon Shoghi Effendi Rabbani (1897-1957) kiel la "Gardanton de la Afero de Dio" por anstataŭi lin kaj disvastigi la Bahaan Kredon tra la tuta mondo. La bahaa komunumo estas kolegie gvidita de la "Manoj de la Afero de Dio" inter la forpaso de Shoghi Effendi kaj la unua elekto en 1963 de la "Universala Domo de Justeco", kiu ekde tiam ĝin gvidas.

## FUNDAMENTOJ DE LA BAHAAJ INSTRUOJ

La Bahaa Kredo aperas kiel la plej nova monoteisma religio abrahamida. Estas nek dubo pri la historia realeco de Bab kaj Baha'u'llah nek pri la aŭtentikeco de iliaj skribaĵoj, kies originalojn ni posedas en la lingvoj araba kaj persa, kiujn ili propramane skribis aŭ diktis al siaj sekretarioj kaj poste sigelis. Ne ekzitas en la Bahaa Kredo io simila al raportita "tradicio" pri iliaj vortoj kaj agoj. Kaj dank'al tio, kion la bahaanoj nomas la "Alianco de Baha'u'llah", estas klare difinita kiu post li rajtos interpreti la sanktajn skribaĵojn kaj gvidi la bahaan komunumon. Tio garantias kaj protektas ĝian unuecon kontraŭ iu ajn daŭra skismo

La mesaĝo de Baha'u'llah estas, ke por la homaro alvenas la Tago de la Releviĝo kaj de la Juĝo anoncita en la pasintaj skribaĵoj religiaj. Ne temas pri fizika detruo de la mondo sed pri fundamenta ŝanĝo de civilizacio, ia tumulta adoleskanteco kun duboj kaj krizoj inter la

infaneco kaj la matureco de la homaro. Baha'ullah asertas ke post li tra la tempoj sinsekve aperos aliaj "Grandaj Edukistoj" kiel li por daŭre gvidi la homaron ĝis la kulmino de la homa civilizacio.

Baha'u'llah rememorigas la fundamentan gravecon de la religio por la bonstato tiel de la socio kiel de la individuo. Lia mesaĝo baziĝas sur triobla unueco : la unueco de Dio, la unueco de la religioj kaj la unueco de la homaro. Tamen unueco ne en uniformeco sed en diverseco :

*"La celo de la religio revelaciita el la ĉielo de la sankta volo de Dio estas estigi la unuecon kaj la konkordon inter la popoloj de la mondo; ne faru ĝin kaŭzo de malkonkordo kaj lukto. La religio de Dio kaj lia leĝo dia estas la plej potencaj iloj kaj la plej efikaj rimedoj por aperigi la lumon de la unueco inter la homoj. La progreso de la mondo, la disvolviĝo de la nacioj, la trankvileco de la popoloj kaj la paco por tiuj vivantaj sur la tero, troviĝas inter la principoj kaj ordonoj de Dio. La religio havigas al la homo la plej altvaloran donacon, proponas la pokalon de prospero, donas la vivon eternan kaj superŝutas la homaron per nepreeblaj bonoj."*

*"La Granda Estulo diras : Oh vi, homidoj ! La fundamenta celo de la kredo je Dio kaj de Lia religio estas protekti la interesojn de la homa raso, starigi ĝian unuecon kaj kreskigi inter homoj spiriton de amo kaj de frateco. Ne permesu, ke tiu kredo fariĝu inter vi fonto de malordo, de malkonkordo, de malamo kaj de malamikeco. Tiel estas la rekta vojo, kiun vi devas sekvi, la neŝanĝebla fundamento sur kiu vi devas konstrui. Ĉion, kion vi starigos sur tiaj bazoj, ne povos malfortigi la ŝanĝiĝoj de tiu mondo nek ĝian strukturon subfosi la pasado de sennombraj jarcentoj."*

*"La celo de la unusola vera Dio (ekzaltata estu Lia gloro !), sin malkaŝante antaŭ la homoj, estas aperigi la perlojn kaŝitajn en la minejo de ilia intima kaj fundamenta memo. La esenco de la kredo je Dio kaj de Lia religio nuntempe rezidas en la principo, ke la diverseco de eklezioj kaj de kredoj neniel devas esti kaŭzo de malkonkordo inter la homoj. Tiuj reguloj kaj kutimoj, tiuj potencaj sistemoj religiaj tiom firme starigitaj, devenas de la sama fonto kaj estas la radioj de unusola lumo. Ĉiujn iliajn diferencojn kaŭzas la diversaj bezonoj postulitaj dum la tempoj de ilia proklamado. (…) La malamo kaj la fanatikeco religia estas senbride konsuma fajro, kiun neniu povus estingi. Nur la mano de la dia potenco povas liberigi la Homaron de ĝiaj ruinigaj efikoj. La Dia Parolo estas lampo, kies lumo rezidas en tiuj vortoj : vi estas la fruktoj de sama arbo, la folioj de sama branĉo. Ĉiam rilatu inter vi kun sento de amo kaj harmonio, kun spirito plej amika kaj frateca. (…) Ne gloru sin tiu, kiu amas sian propran landon, sed tiu, kiu amas la tutan homaron. La Tero estas nur unu lando, kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj."*

Baha'u'llah instruas, ke la religioj konsistas el du partoj : la unua parto estas neŝanĝebla ĉar ĝi temas pri la homa naturo kaj ĝia rilato al Dio; la dua parto estas ŝanĝebla laŭ tempoj kaj lokoj ĉar ĝi temas pri funkciado de la komunumo kaj de la socio. Li ankaŭ instruas, ke la dia revelacio estas daŭra kaj grada por adapti la edukan procezon de la homaro al ĝiaj kapabloj.

Baha'u'llah konservas por la kulto la tradiciajn principojn de kreda konfeso, de preĝado, de fasto, de almozdono, de pilgrimado, de religiaj festoj kun kalendaro, de geedziĝo kaj de funebro, laŭ praktikaj formoj taŭgaj por nia moderna mondo. Li indikas vojojn sekvendajn por ke daŭre stariĝu tutmonde homa socio unuiĝinta, pacema kaj justa. Li insistas pri persona serĉado de vero, pri deviga edukado de infanoj kaj sci-akirado por ĉiuj, pri harmonio inter religio kaj scienco, pri produktado de riĉaĵoj kun respekto kaj justeco, pri

malpermeso de nenifarado taksante laboron kiel adoragon, pri rajtegaleco inter viroj kaj virinoj, pri devigaj starigo de internacia konsilantaro de registaroj kaj adopto de universalaj lingvo kaj alfabeto por ke la homaro estigu interkompreniĝon, unuiĝon kaj pacon.

## ORGANIZADO DE LA BAHAA KOMUNUMO

Bahaano oni fariĝas ne denaska sed post memvola deklaro libera ekde la 15a jariĝo. Ne trudeble estas fariĝi aŭ resti bahaano, sed deklari sin bahaano estas firma promeso vivi laŭ la leĝoj kaj principoj ediktitaj de Baha'u'llah, kaj ankaŭ resti fidela je lia Alianco. La komunumo administracie baziĝas sur la ĝemelaj institucioj de la "Gardanto de la Afero de Dio", kiu rajtas klarigi la bahaajn skribaĵojn sanktajn, kaj de la "Universala Domo de Justeco", kiu rajtas leĝdoni pri ĉio ne revelaciita en la bahaaj skribaĵoj sanktaj.

Nur Baha'u'llah, la "Centro de Lia Alianco" ('Abdu'l-Baha) kaj la "Gardanto de la Afero de Dio" (kiel Shoghi Effendi Rabbani) posedas aŭtoritaton por klarigi la bahaajn skribaĵojn sanktajn. Bahaano povas havi propran opinion pri ili sed ĝi estas nek trudebla al aliuloj nek oponebla al aŭtoritataj klarigoj de tiuj tri centraj figuroj. Kvankam neniu plu havas la necesajn kvalitojn por fariĝi Gardanto post Shoghi Effendi Rabbani, tiu instuticio ne malvalidiĝas kaj daŭre protektas la bahaan komunumon kontraŭ skismon.

Estas nek asketoj, nek monaĥoj, nek pastroj, nek ekleziularo en la Bahaa Kredo kaj la komunumo estas regata laŭ la principoj de grada aŭtoritato, de konsultado kaj de voĉdono. En ĉiu loko, kie loĝas almenaŭ naŭ plenkreskaj bahaanoj, estas ĉiujare elektita "Loka Spirita Asembleo" por mastrumi la aferojn komunumajn. Ankaŭ ĉiujare estas elektita "Nacia Spirita Asembleo" por mastrumi la bahaajn aferojn en ties lando. Kaj po kvinjara periodo estas elektita la "Universala Domo de Juteco", kiu tutmonde regas la bahaan komunumon. La bahaanoj konsideras, ke ĝiaj decidoj estas "die inspiritaj" kaj observendaj. Krom tiuj "elektitaj" institucioj ekzitas ankaŭ "nomumitaj" konsilantaroj, kiuj anstataŭas la "Manojn de la Afero de Dio" por instrui, disvastigi kaj defendi la Bahaan Kredon.

## RETEJOJ PRI LA BAHAA KREDO

Bahaa libraro en la angla lingvo > http://bahai-library.org
Bahaa libraro en la franca lingvo > http://www.bahai-biblio.org
Bahaa libraro en la persa lingvo > http://reference.bahai.org/fa/
Bahaa libraro en la araba lingvo > http://reference.bahai.org/ar/
Bahaa libraro en esperanto > https://ebcoffinet.fr/U-tekstoj/home-U.html
Oficiala retejo de la bahaa komunumo de Francio > http://www.bahai-fr.org
Oficiala retejo plurlingva de la bahaa komunumo tutmonda > http://www.bahai.org

**Bahaa Esperanto-Ligo ( B.E.L. )**
Eppsteiner Str. 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain, Germanio
Faksilo +49-(0)6192-9929-99
https://bel.bahai.de
bel@bahai.de